

# Nova sensacia sukceso en Hollywood

Unua grandfilmo

kiu enhavas originalan Esperantan kanton

« Paramount Studio » estas la tria granda filmfarejo kiu fariĝis amiko, subtenanto kaj uzanto de Esperanto.

Nova populara kanto originale verkita en Esperanto estas kantata de du mondfamaj steloj kaj 100 geaktoroj.

Bing Crosby kaj Dorothy Lamour en la filmo « Vojo al Singapuro » perdiĝas sur tropika insulo. Por eviti la neceson fari la insulon aŭtentika en ĉiuj detalaĵoj, oni bezonis neŭtralan lingvon. Do la tre fama usona kantverkisto Johnny Burke kaj la filmfareja direktoro Harlan Thompson aprobis la uzon de Esperanto. Por la nove kreita sudmar-insula festen- kaj danc-kanto verkis s-ro Joseph R. Scherer la originalan Esperantan tekston.

Gratulojn pro la apliko de Esperanto en la nova grandfilmo « Vojo al Singapuro » oni sendu grandamase per leteroj kaj kartoj al: **S-ro Direktoro Harlan Thompson, Paramount Studio, Hollywood, Kalifornio, Usono.**

Ni emfazas la gravecon ke nepre multaj gesamideanoj el la tuta mondo alskribu la direktoron de Paramount Studio. Nur tiamaniere ni havas la eblecon pruvii al la film- eminentuloj de Hollywood ke Esperanto jam nun havas grandan disvastigon. S-ron Clarence Brown, la faman reĝisoron de M.G.M., atingis post nia alvoko proksimume 2000 leteroj kaj kartoj, kiuj faris en la film-metropolo grandan impreson. Se estus 20.000, la impresado estus eĉ impona. Zorgu ke la direktoro de Paramount ricevu minimume la saman nombron da Esperantaj korespondaĵoj kiun ricevis s-ro Brown! Eĉ refoje skribu tiuj al s-ro Clarence Brown, kiuj intertempe jam vidis-aŭdis la filmon « Idiot's Delight »!

Subtenu la laboron de nia s-ano Scherer! Kredu ke tiu laboro ne estis facila! Dum multaj jaroj li vane klopodis sed fine lia persistado sukcesis. En mallonga sinsekvo nun jam tri gravaj filmkompanioj (M. G. M., R.K.O. kaj Paramount) unu post la alia aplikis Esperanton. Kelkaj eble opinias ke la uzo de Esperanto en tiuj filmoj estas minimuma, kaj

nesufiĉa. Nu, karaj gesamideanoj, estanta, estas via afero, zorgi ke la apliko de Esperanto en la sonfilmo okazu pli kaj pli ofte kaj je ĉiam pli granda amplekso. Ni plej bone atingos tion, pruvante al la film- eminentuloj la disvastigon kaj uzeblecon de Esperanto per tio ke ni ĉiuj sendos al ili gratulon, kun la promeso viziti la filmojn, kiuj aplikas Esperanton, kaj rekomendi ilin al ĉiuj konatoj.

## Roosevelt serĉas lingvon

La 11-an de novembro diris Prezidanto Roosevelt, okaze de la Jubileo de l' Milita Instituto de Virginio:

« La mondo bezonas novan, pli bonan pacon, — pacon kiu devigos la homojn formeti la armilojn uzitajn por disigi ilin. Ĝi ankaŭ devos rezigni la sencelajn ambiciojn kiuj kaŭzis timon, — la ambiciojn servantajn al nenia utila celo. **Ni serĉas lingvon, per kiu la najbaro povos paroli al la najbaro, per kiu homoj povos paroli al homoj,** kaj per kiu la ĝeneralaj homaj instinktoj, ĉie trovataj, povos trovi esprimon per forpreno de la timo. »

Prezidanto Roosevelt serĉas lingvon, per kiu la najbaro povos paroli al la najbaro, per kiu homoj povos paroli al homoj! Bonege! Tia lingvo ekzistas: ĝi nomiĝas Esperanto.

Estas evidente ke Roosevelt celis per siaj vortoj ne iun difinitan lingvon, sed la homan parolon mem, la parolon de l'koro kaj kompreno. Eĉ tio estas Esperanto en la plej alta grado.

Lernigu Esperanton al la tuta mondo, — kaj la teknikan, la nur-lingvan komprenon baldaŭ sekvos tute certe ankaŭ pli bona kompreno per la spirito kaj per la koro!

# Granda ekscito en Paramount Studio

PARAMOUNT PICTURES INC.  
WEST COAST STUDIOS



Estimata Sinjoro:

Estas granda ekscito en Paramount Studio. Esperanto, la internacia lingvo, estas uzata en "Road to Singapore".

Tuta insulo kantas en la muzika lingvo kiu estas parolata de 4 miliono Esperantistoj en 100 landoj.

Estos agraba surprizo por vi kiel bele ni kantas en Esperanto. Estas la unua filmo el Hollywood kiu kantado en la neutrala lingvo.

Atendu ĝis kiam vi aŭdos min kaj Bing amkant al Dorothy en Esperanto.

Sincere via

Bing  
Bob  
Dorothy

Estas bone». Tial ni ne pli gravigu la aferon, ol ĝi estas. Al s-ro Scherer, la direktoroj de la filmstudioj, la reĝisoroj kaj la filmsteloj gratulon kaj dankon! Ni ĉiuj esperas iam vidi la unuan sonfilmon tute en Esperanto parolatan, kaj poste, kiam nia lingvo jam estos ĝenerale enkondukita, grandegan evoluon de la sonfilmo kune kun Esperanto tra la tuta mondo, je neimagita grado. Tiu tempo venos!

La bruaj jaroj post 1920, Hollywood  
Tondro sur la Maro (Beery), Miela  
en Bali, Kato kaj Kanario, Polvo estas  
destino, Kia vivo (Cooper), Aventuroj de  
Sherlock Holmes, Vintra Karnavalo, Kiam la  
venos (Boyer & Dunne), La maljuna  
italino (Davis), Ĉiumatene mi mortas (G  
ney), **Konspiro** (kun Esp. afiŝoj kaj vortoj),

Ili havu muzikon, Dum prunteprenita tempo,  
Kvin revenis, Kuraĝaj fratinoj, Man about  
Town.

Ne forgesu, ke ju pli da eltranĉaĵoj kun re-  
presoj kaj tradukoj de miaj artikoloj mi ricevas,  
des pli mi povas varbi por la plia uzo de  
Esperanto en novaj filmoj.